


***Paŝante***

***inter***

***enfaluloj***

***Enfalujo:***  
***fosaĵo por***  
***enfaligi***  
***bestojn***  
***kaj***  
***tradukistojn***



***Kiel ni tradukis  
rakontojn de  
Machado de Assis***



**Francisco  
Stefano  
Wechsler**

***Enkonduko***

## **La aŭtoro**

Machado de Assis  
(1839–1908)

Unu el la plej elstaraj verkistoj de Brazilo kaj de la portugala lingvo.

Li verkis rakontojn, kronikaĵojn, romanojn, poemojn kaj recenzojn.

## **La stilo**

Eleganta kaj simpla.

Majstra regado de la portugala.

Subtila kaj ofte ironia.

Riĉa je aludoj.

Riĉa je enfalujoj por tradukistoj!

*Machado de Assis*

*La sekreta kaŭzo  
kaj aliaj rakontoj*

Tradukis:

Francisco Stefano Wechsler  
Paulo Sergio Viana

Wechsler Editora de Livros Ltda.

## **La rezulto:**

- naŭ rakontoj el pluraj fazoj
- du tradukistoj
- 128 paĝoj
- beletra, geografia kaj historia esplorado
- abundaj piednotoj
- facile legebla tiparo

***Unua malfacilaĵo:  
fidinda el dono***


La plimulto de la  
eldonoj *ne fidindas!*

Interretaj versioj *tute  
ne fidindas!*

Solvo: la Kritikaj Eldonoj.

Teksto fiksita de fakula  
komisiono.

Eldonoj elĉerpitaj,  
aĉetebraj nur brokante.



MACHADO DE ASSIS  
*Machado de Assis*

# PAPÉIS AVULSOS



GARNIER

Ne disponeblas kritika eldono de *Disaj paperoj*.

Ni do uzis reviziitan eldonon de Garnier.

La rakonto *Kiel oni inventis almanakojn* ne publikiĝis en libro dum la vivo de Machado.

Ni do uzis la unuan libreldonon (1956).

***Dua malfacilaĵo:  
la tiama lingvo***

## **Portugallingve**

*referir*

*almoçar, jantar,  
cear*

*espírito*

*moral*

*corredor*

## **Nuntempe**

rilati, koncerni

tagmanĝi,  
vespermanĝi,  
noktomanĝi

spirito, animo

moralala

koridoro

## **Machado**

rakonti, raporti

matenmanĝi,  
tagmanĝi,  
vespermanĝi

menso, intelekto

mensa, intelekta

pasejo,  
ĝardenvojeto

***Tria malfacilaĵo:  
parolturnoj, stilfiguroj  
kaj vortludoj***

Origina metonimio:

*Pestana, ainda **donzel inédito**, recusou qualquer das denominações e guardou a polca; [...]*

Traduko kun metonimio:

*Pestana, ankoraŭ **neel-donita naivulo**, rifuzis ambaŭ titolojn kaj enkestigis la polkon; [...]*

Traduko sen metonimio:

*Pestana, ankoraŭ **naivulo sen eldonaĵoj**, rifuzis ambaŭ titolojn kaj enkestigis la polkon; [...]*

Traduko kun metaforo:

*Pestana, ankoraŭ **virgulo pri eldonaĵoj**, rifuzis ambaŭ titolojn kaj enkestigis la polkon; [...]*

*Desta vez será uma robusta Americana, vertendo sangue pelas faces, formas arredondadas, olhos vivos e ardentes, **mulher feita, refeita e perfeita.***

*(El Miss Dollar.)*

Ĉi-foje ŝi estus fortika usonanino, sur kies vizaĝo sango fluegas, kun rondaj korpkonturoj, okuloj vivecaj kaj ardaj, **virino plena, replena kaj senĝena.**

*[...] reviu todas as suas notas de escravos fugidos. As gratificações pela maior parte eram promessas; algumas **traziam a soma escrita e escassa.***

*(El Patro kontraŭ patrino.)*

*[...] li reviziis ĉiujn siajn anoncojn pri fuĝintaj sklavoj. La rekompencoj estis plejparte promesoj; kelkaj **menciis monsumon avize sed avare.***

***Kvara malfacilaĵo:  
loknoj***

## **Machado**

*Rua dos Barbonos*

*Rua da Ajuda*

*Beco do Cotovelo*

*Rua Mata-Cavalos*

*Roda dos Enjeitados*

## **Esperantigo**

Strato de l' Kapucenoj

Strato de l' Helpo

Strateto de l' Kubuto

Ĉevalmortiga  
Strato

Rado de l' Forĵetitaj

## **Nuntempe**

Strato Evaristo da Veiga

nur parteto

ne plu ekzistas

Strato Riaĉuelo

ne plu ekzistas

***Multaj lokoj ne plu  
posedas la antaŭan  
gloron kaj ĉarmon***

## Portugale

Rua do Ouvidor

Catumbi

Gamboa

## Esperante

Strato de l'  
Juĝisto

Katumbio

Gamboo

## Evoluo

Tiam riĉa je luksaj  
butikoj; ne plu.


Tiam kun riĉaj  
duetaĝaj domoj;  
nuntempe proleta  
kvartalo.

Tiam kun riĉaj  
domoj, enloĝataj  
de angloj; nun-  
tempe proleta  
kvartalo.

***Kvina malfacilaĵo:  
plurspecaj aludoj***

***Útila konsultejo:***

***[www.machadodeassis.net](http://www.machadodeassis.net)***



***Aludoj al tiamaj  
politikaj okazaĵoj***

La liberaluloj estas nomumitaj por la ministraro;  
ili reformos la balotsistemon. La polko nomiĝos  
*Aplaŭdojn al la rekta balotado!*

(El *Unu fama homo.*)

## **Klarigo:**

Ĝis 1881, balotado en Brazilo estis nereakta: balotantoj elektis laŭdistrikte reprezentantojn, kiuj siavice elektis parlamentanojn.

La eldonisto kapneis, kaj diris, ke titoloj devas esti per si mem destinitaj al populareco, — ĉu per aludo al iu nuntempa okazaĵo [...]; li proponis al li du: *La leĝo de la 28-a de Septembro*, aŭ *Kaĵoloj ne karesas*.

(El *Unu fama homo*.)

## **Klarigo:**

Temas pri la Leĝo de Libera Ventro, sankciita en 1871, laŭ kiu ekde tiu dato ĉiuj sklavinoj naskos liberajn infanojn.

***Aludoj al tiamaj  
moroj***

Andrade manpreme komplimentis la du sinjorinojn, tio estas, li premis la manon de Antônia kaj la fingrojn de Margarida.

(*El Miss Dollar.*)

## **Klarigo:**

Margarida limigas la komplimenton al premo de fingroj por ne permesi troan familiarecon.

— Mi pensas, S-ino Antônia diris, ke mia aĝo permesas, ke mi vizitu fraŭlon.

(El *Miss Dollar*.)

## **Klarigo:**

Laŭ la tiamaj moroj, vizito de neakompanata virino al fraŭlo estis motivo por klaĉado.

***Historiaj kaj religiaj  
aludoj***

- Ne gravas al vi mia nomo; sufiĉas scii, ke mi povas donaci al vi ĉiujn perlojn de Golkondo...
- Adiaŭ !
- Diamantojn el Ofiro...
- Adiaŭ!
- Rozojn el Ŝarono...
- Adiaŭ! Adiaŭ!
- Vinberejojn en Engedo...

*(El Kiel oni inventis almanakojn.)*

*Kiom da aludoj vi kapablas trovi?*

***Beletraĵaj aludoj***

Mi eliradis kaj paŝadis, de unu loko al alia, klopodante eltrovi ian signon de reveno. *Soeur Anne, soeur Anne, ne vois-tu rien venir?* Nenion, nulon, precize kiel en la franca legendo.

## **Klarigo:**

Citaĵo el la franca popolrakonto *Blubarbulo*. La edzino de Blubarbulo atendas, ke ŝiaj fratoj venos savi ŝin, kaj ripete kridemandas sian fratinnon Anno, kiu supreniris al kastelturo, ĉu ŝi ne vidas ion.

Oni preskaŭ povus diri, ke en la spirito de Mendonça hundo pezas tiom, kiom amo, laŭ fama diraĵo: forprenu el la mondo la hundon, kaj la mondo fariĝos malplenaĵo.

## **Klarigo:**

*Kio okazus al mondo sen virinoj? Al pasioj donu laŭpove la plej egan ardon, al plezuroj miloblan intenson, al sensoj maksimuman energion kaj ŝanĝu la mondon al paradizo, sed forigu el ĝi la virinojn, kaj la mondo fariĝos melankolia malplenaĵo, la plezuroj estos nur preludo de enuo.*

Alexandre Herculano

***Jen la lasta ekzemplo.***

***Dek aludoj en unusola alineo!***

La finon de la rakonto oni diris **latine**. Quintanilha rolis kiel atestanto por la fianĉo kaj baptopatro por la du unuaj filoj. Unu tagon, kiam, portante dolĉaĵojn al siaj baptofiloj, li trairis la **Placon de l' Dekkvina de Novembro**, trafis lin **ribela kuglo (1893)**, kiu mortigis lin preskaŭ tuj. Li kuŝas enterigita ĉe la **tombejo de Sankta Johano Baptisto**; la tombo estas simpla, la memorŝtono montras epitafon, kiu finiĝas per tiu ĉi pia frazo: **“Preĝu por li!”** Jen ankaŭ la fino de mia rakonto.

**Oresto** ankoraŭ vivas, sen la **pentsufero de la greka modelo**. **Pilado** nun estas la **muta rolulo de Sofoklo**.

Preĝu por li!

***Konkludoj***

Tradukante verkojn de Machado, oni devas translingvigi ne nur la supraĵan tavolon de la teksto, sed ankaŭ dediĉi apartan atenton al *subkuŝantaj signifoj*.


Ĉi tiu tasko fariĝas ankoraŭ pli grava kaj tikla, kiam oni celas *internacian publikon*, ĉar la probable de miskompreno altiĝas.

***Ni finas per mesaĝo  
de niaj sponsoroj***

[www.gust.org.pl](http://www.gust.org.pl)



[www.gimp.org](http://www.gimp.org)



[www.inkscape.org](http://www.inkscape.org)



[www.libreoffice.org](http://www.libreoffice.org)



[www.dejavu-fonts.org](http://www.dejavu-fonts.org)



[www.arkandis.tuxfamily.org](http://www.arkandis.tuxfamily.org)





[www.scribus.net](http://www.scribus.net)



***Kontraũstaru  
monopolon!***

***Uzu Linukson.***

***Dankon!***